

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 57

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 marto 1925

OUR FIFTH CONGRESS.

April 10—16.

The following items have now been definitely arranged for the Congress:—

Saturday evening—Musical and Dramatic Recital in Esperanto at the Austral Salon.

Sunday afternoon—Visit to the Botanical Gardens. Sunday evening—A special sermon will be preached at the Australian Church by the Rev. Dr. Strong.

Monday—All day picnic to Eltham. Tuesday evening—Opening of the Congress in the Assembly Hall. Mr. Justice Higgins will deliver an address.

Wednesday evening — Children's Concert in Esperanto at the Melba Hall, University.

Thursday evening — International Costumes Ball in the Ormond Hall.

Trouble is being experienced in arranging a meeting for Good Friday evening as this day is observed more or less as a Sunday. It has been decided to leave this night vacant for the present.

During the week there will be a Congress Business Meeting and also meetings of those interested in the Australian Esperanto Association and the Universal Esperanto Association. Members who wish to bring matters for discussion before any of these meetings are requested to send their

proposals to the secretary as early as possible.

Country and Interstate members who wish the organisers to arrange accommodation for them must send full particulars of their requirements at once.

As this is the last issue of the "Suda Kruco" before the Congress, members are asked to write to the secretary if they desire further information.

Esperantists will understand that a programme such as has been drawn up entails much expense. They will relieve the anxiety of the organisers if they send their subscriptions at once. The fees are:—Country and Interstate members, 10/6; Melbourne members, 21/-.

During the Congress the official address will be 212 Swanston Street, where all cards, programmes and information can be obtained.—R. R. Rawson, Hon. Secretary; H. Byatt, Hon. Treasurer.

NEKROLOGIO.

After a long and painful illness, Mrs. Selma Klein, of Sydney Road, Brunswick, succumbed on the 7th February. The deceased lady was a very enthusiastic member of the Melbourne Esperanto Society. Her help and ever ready advice will be greatly missed. On behalf of the local Esperantists sincere sympathy is extended to Mr. Klein and family.

A MODERN WYTHARYNTON.

By Percy W. Merrick.

For over twenty years I have enjoyed intimate correspondence with a man who is both deaf and blind, and I am tempted to wonder if his achievements might interest others.

Harold Thilander was the son of a village schoolmaster in Sweden. He was born in 1877, and in his seventh year, after a violent attack of scarlet fever, became quite blind, very deaf and so weakly that any idea of further education seemed to be out of the question. At nine years old, having lost his father, he found himself in Eugenia Hemmet, a school and home for the disabled in Stockholm, where he was well cared for and might have remained sheltered for the rest of his life.

For some years he suffered from various maladies, but at sixteen his health improved; he awoke to a keen desire for knowledge and longed to gain his own livelihood and to be of real use to his fellow men, especially to those who were blind like himself. Despite his deafness, he persuaded other inmates of the home to dictate to him all kinds of school books, especially grammars and dictionaries of foreign languages, which he wrote down in Braille and studied very thoroughly. He must indeed have worked like a hero, for his English dictionary alone filled twenty thick volumes in Braille.

He obtained correspondents in many countries. Each of these friends, he found could give useful hints and experiences, while he could fully recompense them in turn by translating for each the information he had received from others. Thus he saw that if only the blind had a common international language they could co-operate in overcoming the effects of their common handicap.

At first he thought they should all learn English, but the impossibility of transcribing our enormous dictionary into Braille for students of all countries made the scheme unworkable. In 1902 he got to know Esperanto, which, owing to its ingeniously simple construction, can be learnt from a very small text book. With great energy he set to work to convince all his correspondents that this language would be invaluable as a common medium of expression. He

induced them to learn it by copying the key into Braille for them in their own tongues and by sending them something in Esperanto that he knew they particularly wanted to read. This induced a prominent Esperantist to state the case for Esperanto among the blind in the chief Esperanto magazine. This attracted the attention of M. Cart, who collected enough money to print the key in Braille in several languages and to start in 1904 a universal Esperanto magazine, "Esperanta Ligilo" (a link for the blind).

In 1909 Thilander found employment at the Swedish National Library for the Blind, where he showed great talent in adapting educational books to the use of sightless students. Then he was made editor of the Swedish Braille weekly, maintaining the necessary machines, and up a Braille press of his own.

In 1912, when Mr. Cart was too busy to continue editing the "Ligilo," Thilander stepped in, took the whole responsibility of editing, printing and publishing the magazine upon his own shoulders, and even found financial supporters for it, as the blind readers are unable to subscribe enough to pay for its production. He maintained it during the war until 1916, when it became impossible to distribute it to the blind readers of the twenty-seven countries where it circulated.

After the War Thilander again started "Ligilo," aided by generous grants from our National Institute for the Blind. He has shown himself to be a marvellously expert editor, owing to his wide acquaintance with blind folk and their needs and tastes.

With a circulation of 750 copies a month in thirty or more countries "Ligilo" has established itself as a very real link for the blind, for its readers, all of whom feel that they are personal friends of the editor, include many experts in various accomplishments, who freely give each other the benefit of their experience. Often its articles are so important that they are translated for national Braille magazines. Good stories, poems, songs with music, and scientific notes are taken from current Esperanto literature, and just at present much attention is being given to wireless, which is so eminently suited to the entertainment and instruction of the blind. Maps of many countries

have been given from time to time and diagrams of flags indicating not only their forms but their colours have given great pleasure to the readers.

The "Ligilo" has a "consul" in each country who introduces correspondents, gives information when required to his countrymen concerning Esperanto and to foreign enquirers on an infinity of matters relating to the blind and keep all in touch. Many readers who formerly led isolated lives have been encouraged to become pioneers of education among the blind of their country, and much splendid work has been accomplished by them.

Our modern Wytharynton is now fighting harder than ever. Always ready with some new device for the entertainment or assistance of his readers he labours from morning to night and however tired he may be physically never allows a hint of it to appear in his letters which are always kindly and full of wit and wisdom. To appreciate his happy nature one must have stayed with him in his country summer cottage near Stockholm, as I have.

And this man, deaf and blind, gay and ever helpful, is the leader of the blind Esperantists of the world. His work for Esperanto is honorary, for he maintains himself by his other Braille printing.

—El Esperanto Triumfonta.

LA KONGRESO DE LA UNIVERSITATAJ VIRINOJ POR ESPERANTO.

Kristiania. Ĉe la tria internacia kongreso de l' universitataj virinoj la demando pri internacia lingvo oficiala provokis interesajn diskutojn. Fine la kongreso deklaris sin favora al Esperanto kaj ĝi malakceptis la anglan lingvon; ĝi same malaprobis ĉiun alian malovan aŭ modernan lingvon.

— El Esperanto Triumfonta.

LITERATURO.

Fama Biblioteko Transmigris al Jerusalem.

La Londona Komitato por la Hebrea Universitato en Jerusalem akiris la grandan orientan bibliotekon de la mortinta budapesta profesoro Ignaz Goldziher kaj en la lastaj tagoj februara la biblioteko estas ekspedita trans Trieste al Palestino. Post kelkmonata intertraktado la hungara registaro permesis la elmigradon de la biblioteko, kiu estas en sia fako unu el la plej famaj. Ĝi estas plej granda privata libraro tiuspeca, konsistanta el 6000 verkoj priskribantaj en diversaj (ĉefe orientaj) lingvoj ĉiujn fakojn de la semida scienco. Ĝi enhavas plurajn arabajn, persajn kaj turkajn librojn, da kiuj estis en Eŭropo unusola ekzemplero. El la lasta jarcento ĉiuj konataj aperintaĵoj enestas. Speciala fako estas dediĉita al la moderna araba kaj hebrea sciencoj. Grandan valoron havas multaj marginaj rimarkoj de la mortinta profesoro. — La biblioteko estas destinita por la fondota Hebrea Universitato en Jerusalem, kiu fariĝos tutmonda centro de hebrea scienco. Ankaŭ la araba sciencularo palestina trovos en la kolekto valoran helpon en sia laboro.

—L. J., London, el Esperanta Triumfonta.

ANONCOJ.

Junulo 18 jara deziras korespondi kun Esperantisto, ĉirkaŭ samaĝa, en aŭ Australio aŭ Nova Zelando. O. H. Behneken, Boona, Kvinslando.

DEZIRAS INTERSANGI P.M.

Adreso, Rusujo, Moscow, Tverskoj Boulevard 12. Commissioner for Philateli and Vouchers, por No. 278 S-ro T. Gilpin, Barnaulo, Siberio.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Porta ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata sinjoro,

Per tiu ĉi letero mi penos interesi vin pri la loke nomataj "Mutton" birdoj (puffinus tenuirostris), kiuj ĉiujare revenas al kabo "Woolamai" ĉe insulo "Phillip," en la suda parto de Viktorio, kaj strange estas, ke tiu ĉi reveno ĉiam okazas je la sama dato, kaj horo, tio estas je la 23 novembro, je la oka horo, kaj dum 5 monatoj la birdoj revenas de la maro je la 8 horo ĉiu vespero al la bredejo. Ĉiu vespero dum tiuj monatoj, vizitantoj ĉe insulo "Phillip," kiu estas bone konata banloko, 40 mejlojn for de Melburno, iras al la kabo por vidi la revenon de la birdoj.

La "Mutton" birdo estas arĝent-griza laŭ koloro, kun akra beko, kaj palmipeda, kaj laŭ grandeco iom pli grandkorpa ol la mevo (Larus), kaj havas plilongajn flugilojn, kiuj de unu pinto ĝis la alia havas almenaŭ 34 colojn da longeco, kaj per tiuj ĉi longaj flugiloj, oni diras, ke ĝi povas flugi eĉ plirapide ol la nigra anaso. Ĝia kapablo flugi trans grandaj distancoj starigis multajn teoriojn, pri kiuj restas la birdoj dum la vintro. Frue iun matenon dum la lastaj tage, de aprilo, la milionoj da birdoj forlasas la bredejon ĉe insulo "Phillip," kien la birdoj iras, neniuj scias; laŭ la opinio de kelkaj personoj, la birdoj flugas al Japanujo, laŭ aliaj al Siberujo, laŭ aliaj al alia loko. Estas certe, ke la "Mutton" birdoj venas al insulo "Phillip" nur por breedi, kaj ĉar ili estas petreloj, estas kredinda, ke ili dum la ceteraj monatoj restas ĉiam for de la lando.

La "Mutton" birdoj elfosas tuneletojn en la sablajn montetojn, en kiu la ino demetas kaj kovas nur unu ovon, kaj tiu ovo estas tiel granda, kiel la ovo de kortanaso.

Estas rimarkinda fakto, ke la "Mutton" birdo revenas al la sama tuneleto jaron post jaro, la fakto estas pli rimarkinda kiam oni scias, ke ĉe la ĉefaj bredejoj pli ol 100 akreoj de sablaj montetoj estas elfositaj po unu tuneleto je ĉiu kvadrata futo. Eksperimentoj faritaj dum la jaroj 1920 ĝis 1923 de oficistoj de la registaro pravis, ke el 44 birdoj markitaj 22 revenis al la sama tuneleto, kiun ili okupis dum la lasta sezono, kaj ke 6 okupis apudan tuneleton.

Dum la lasta sezono, mi libertempis ĉe insula "Phillip," kaj vespere

kune kun kelkaj aliaj samideanoj marŝis kelkajn mejlojn trans la sablajn montetojn al kabo "Woolamai" por vidi la alvenon de la birdoj. Dum minutoj antaŭ la 8 horo vespere, vidis nigran nubeton malproksime de la horizonto, la nubeto pligrandigis ĝis ni povis scii, ke ĝi estis antaŭ da rapide flugantaj birdoj, ĉirkaŭ 10 birdoj plirapide flugantaj atingis la kaban antaŭ la aliaj, precize je la 8 horo. Tiuj ĉi ĉirkaŭ flugante, aŭdis ĝis siajn nemuzikajn kaj neordinariajn kriojn, kvazaŭ ili estis feliciaj, ĉu ili denove atingis la hejmon. La reveno de la "Mutton" birdoj komencigis.

Dum kelkaj minutoj ili venis unuope, iom post iom la nombroj pligrandigis, ĝis la ĉielo estis plena de birdoj. Rapidege ili venis de la maro po dekoj, po dudekoj, po centoj, po miloj, sed ne por tuj surteriĝi. Saniĝis ili ne volis tuj surteriĝi post ilia longa flugado, kaj kvazaŭ pro ĝojego ili ĉirkaŭ flugadis, kriante ĝis la maro preskaŭ malluma vespero pleniĝis per la kriado.

Nun je distanco kontraŭ la ĉielon nun nevidebla super la preskaŭ malluma lando oni povis opinii, ke la manovroj estis sencelaj, sed atentobservanto povis vidi, ke ĉiu birdo estis denove kaj denove proksimiĝanta je unu definitiva tuneleto, kaj unue ia deziro halti tie ne montriĝis, sed post multaj ĉiam plimallongaj ĉirkaŭflugoj venis la tempo, kiam ili rapidece malpliigis, la flugilojn ion frapetis kaj je la proksima ĉirkaŭflugo la birdo haltis en la aero, kaj surteriĝis tiel malpeze, kiel la falanta neĝo, je la buŝo de sia propra tuneleto, sed ankoraŭ ne volis resti. La kabo estis tre aferplena, novaj venantoj kurante jen tie ĉi jen tie ekzamentante, malakceptante, vizitante, amumante, kaj kantante siajn profundmarajn kantojn.

Je la duono post la 20 horo, ĉe pli ol 100 akreoj de la kabo, troviĝis amasego da ekscitigitaj birdoj. Kolekti ajn krioj, jen tie ĉi jen tie sciigis al ni, ke bataloj okazas. Nun kaj de nove birdo estis vidita rapide eliranta el tuneleto, dum lia plisukcesa kanto trairulo kriadis pro triumfo. Similaj aferoj okazis samtempe ĉe dekduoj de malpligrandaj bredejoj ĉirkaŭ la insulo; kiuj kune mezuras linion de bredejoj 6½ mejlojn longajn, kaj 12 birdoj oni devas kalkuli laŭ milionoj.

Estas tre malfacile por la "Mut-ton" birdo altigi sin en la aeron de plata tero, kiel la landbirdoj povas fari. Ĝia kutima metodo estas marŝi malgracie ĝis la rando de la klifto, kaj malsupren sin ĵeti, tuj ĝi estas en la aero ĝi ja estas gracia.

Multaj personoj vizitas la bredejojn ĉiu jaro, kaj tie kamploĝas por kolekti la ovojn, kiuj estas bongustaj, sed tiu ĉi jaro la registaro malpermis la kolektadon de la ovoj, ĉar la kamploĝantoj pro senzorgeco pri fajro, forbruligis la "Marrum-ton" herbon, kiun kune tenas la sablo, kaj lasis la herbo, la sablo blovata de la vento plenigas kaj detruas la tuneletojn.

Dum la ino kovas la ovon, ŝi ne povas iri al la maro serĉi nutraĵon, tiel la virbirdo devas doni al ŝi manĝi, kaj ĉar ne eble estas porti fiŝon, centoj da mejloj, li manĝas ĉiom kiom li povas kapti, kaj vespere alveninte hejmen, malplenigas el la stomako la duon digestitan nutraĵon en la buŝon de lia edzino.

Salutas vin P.H.

KONGRESAJ AFEROJ.

La jenaj sumoj estas ricevitaj de la kongresa sekretario:—S-ro R. R. Rawson. Donacoj:—Hobart Group, 1/; Glumarkoj venditaj, 1/-; Concert, 6/6; E. J. Day, 5/-; Walking Club, 10/-.

Kongresaj Pagoj:—n-o 48, F-ino L. Walford, 4/-; n-o 62, S-ro W. H. King, 10/6; n-o 63, S-ro W. C. Hunt, 10/6; n-o 64, S-ro F. V. Taylor, 10/6; n-o 49, S-ro R. Jones, 11/-; n-o 65, F-ino M. Belcher, 21/-; n-o 66, S-ro Nash, 10/6; n-o 67, S-ro C. W. Ballard, 21/-; n-o 68, F-ino V. Cox, 16/9; n-o 69, S-ino A. M. Carter, 10/6; n-o 70, F-ino E. Ely, 21/-; n-o 71, S-ro J. Skurrie, 21/-; n-o 72, F-ino A. Moore, 21/-; n-o 73, S-ro W. J. Drummond, 21/-; n-o 74, S-ino Drummond, 1/-; n-o 75, F-ino Pyke, 21/-; n-o 76, W. T. Pyke, 21/-; n-o 77, F-ino B. K. Blyth, 21/-; n-o 78, R. Banham, 1/-; n-o 79, F-ino H. Nugent, 21/-; n-o 47, F-ino E. Godfrey, 15/-; n-o 80, F-ino J. Brown, 10/6; n-o 81, S-ino Brewin, 10/6; n-o 82, F-ino Douglas, 10/6; n-o 83, F. Bailey, 10/6; n-o 84, F-ino Williams, 6/-; n-o 84, S-ro Diggle, 21/-.

FRAGOJ.

Ili anbaŭ estis en la ĉambro solaj. Tio ĉi signifas, ke en la ĉambro estis la tuta mondo, eĉ la belega ĉielo. Se tie troviĝus ankaŭ iu tria persono, ekzemple: la patrino de la junulino, tiam en la ĉambro certe la feliĉo estus malpli granda. Precipe tie ne brilis la ĉielo.

Karlo komencis legi romanon:

"Sonjo kaj Ivo iris en arbaron."

Anjo interrompis lin:

— Ivo, kia malbela nomo!

— Malbela? Diru nomon, kiu plaĉas al vi!

— Mi diros, se vi konfesos, kia nomo estas al via kara.

— Sonjo.

— Tiam plaĉas al mi Ivo. Do legu plue!

"La foliaro bruetis kaj murmuretis mistere."

— Kion ĝi povis murmureti?

— Tion oni ne rakontas ĉi tie.

— Nu, diru vi!

— Ĉu mi estis en la arbaro?

— Kia netolereblulo! Sed, aŭdu ni, kio okazis poste!

"En la arbaro eĉis mirinde birda kantado. Tamen ili ambaŭ aŭdis nenion. Unu ĝuadis la rigardon de la alia."

— Ho, nun jam tio iĝas pli interesa!

"Unu admiradis la okulojn de la alia, kaj en ĉi tiu rigardo perdiĝis iliaj animoj..."

— Anjo, kiam mi rigardas viajn okulojn...

— Rigardu pli volonte en la libron kaj legu!

— Miajn okulojn jam enuigas la nigraj literoj...

— Ne malsagiĝu, daŭrigu.

"La junulino ĉirkaŭprenis la junulon..."

— Ho, tio ja maldecas! Ĉu ŝi ne povis atendi, ĝis...

— Kion, ĉu la pastran beron?

— Ne, sed ĝis la junulo estos ĉirkaŭpreninta ŝin!

— Do, ŝi certe estis tro pasia kaj ne lasis sin petegi, kiel...

— Karlo, tuj mi forlasos vin!

— En la nomo de Dio, ne kriu, oni aŭdos nin!

— Estas vere, legu.

"Sub ombreplena kvarko prezentiĝis al ili ruĝaj fragoj."

— Ho, fragoj, kiel mi deziras lin!

— Mi ne.

— Kion deziras vi?

— Acidajn kukumojn.

— Teruraĵo?

— Vi denove krias!

— Pro kio vi senĉese min incitas? Neniam plu mi legos romanon kun vi!

— Estos pli bone. Lasu ni la romanon. Pli volonte ni babilu!

— Vi ne komprenas tion. Vi ĉiame babiladas ĉiajn sensecaĵojn.

— Mi ja ĉiame parolas nur pri vi, Karlo!

— Ĉiame mi ripetadas, ke vi estas dolĉa, kiel frago.

— Kial vi ne diras: kiel acida kukumo?

— Ĉar ĝi ne estas dolĉa.

— Ree vi petolas. Nu, kion faris plue tiuj gejunuloj?

“Sonĵo deŝiris kelke da fragoj kaj prenis ilin inter la lipojn...”

— Kiel? Kaj al Ivo ŝi donis nenion? Ĉu vi vidas, kiaj estas aliaj knabinoj?

— Atendu nur kaj aŭdu.

“... prenis ilin inter la lipojn kaj diable ridetis al Ivo, tiel ĉarme, tiel aminde.”

— Ho, legu, Dio mia, legu!

“La junulo ĉirkaŭprenis sian ĉarman kunulinon, kaj de ŝiaj lipoj elprenis la ruĝan dolĉaĵon. Kaj ili ambaŭ nutris sin, kiel gekolomboj. En la arbaro troviĝis multaj, multaj fragoj, kaj kiom estis da fragoj, tiom da kisoj ili interŝanĝadis.”

Karlo forĵetis la libron en angulon.

Paŭzo.

Anĵo rigardis siajn ŝuetojn. Kvazaŭ la ŝuista majstraĵo fortege ŝin estus kortuŝinta; ŝiajn blujajn okulojn malsekigis larmegoj.

— Karlo, estas tamen malgaje!

— Kio?

— Ke ... mi ne havas fragojn.

— Ĉu eĉ ne konfititajn?

— Tiajn ni havas, sed ĉe la patrino estas la ŝlosilo de la manĝakamero.

— Kaj ekstere negas. Estas neeble, serĉi en la arbaro.

— Vere terurege!

Denove paŭzo.

— Karlo!

— Anĵo?

— Belega ideo! Ni havas kukumojn!

— Ĉu acidajn?

— Jes, acidajn kukumojn. Panjo ilin preparis por la verspermanĝo kun malvarma rostaĵo. Ĉarmegaj kukumetoj! La okuloj de Karlo ekbrilis. Ankaŭ la okuloj de Anĵo. Malfacile

estus diri, de kiu okuloj pli multe brilegis.

Anĵo prenis etan kukumon inter siajn lipojn. Karlo rapidege demoranduon kaj englutis. Estis tre acida.

— Ĉu estas dolĉa, Karlo?

— Kiel mielo! Ĉu vi havas ankoraŭ pli multe?

— Jes.

— Ĉu ni ekmanĝos ĉiujn?

— Jes.

Kaj la idilia helpilo, la anstataŭaĵo de la frago: la acida kukumo maperiĝis post kelkaj minutoj.

— Anĵo, ĉu vi ne havas plurajn kukumojn?

— Ne, sed ĉu vi scias ion, Karlo?

— Kion, dolĉa Anĵo?

— Ĉu ni ne povus manĝi kukumojn... sen kukumoj?

Kaj ambaŭ gefeliĉuloj komenciguadi fragojn, tio estas kukumojn... sen fragoj, tio estas sen kukumoj.

El sia propra kroata verkaro tradukis

MAVRO SPICER.

PINCER NE KOMPRENAS.

Pinĉer suferis duoble: mense, ĉar lia estro rigardis lin malfavore, kaj korpe, ĉar li ĵus ricevis sian unuan vipadon. Rampante en la stalkorto lia korpa humiligo egalas lian mensan embarason.

La du Airedale'aj hundidoj kun renversigante lude en la stala pafmalĝentile mokis lin, opiniante, ke peza melankolio de Pinĉer pravas, sed li ne povas portumi doloron. Por la vipado estis vipado, kaj do ili la komprenu malestimis lin.

La saĝa, maljuna Diogenes, la plaĝa loĝanto de la stalkorto, pli bone komprenis. Li estis preskaŭ blindsed kuŝante sur la pavimo, palprobrumante pro la sunbrilo, li sciis, ke estas en la menso de la juna Clumber'a spanjelo.

“Nu, nu,” li raŭke blekis, “povon iom da tempo vi komprenos.”

Pinĉer, post zorga aranĝo de siaj doloraj membroj, sidiĝis kaj silente lekis siajn vundojn—fine lia indigno venkis lin, kaj li subite ekkriis: “Kio mi povis scii, ke mi ne devas mortitiun aĉan birdon?” li murmuris malesteme.

“Via patrino estas tre kulpigota respondis Diogenes, “estis ŝia deinstrui vin, ke hundoj neniam mortigu fazanojn.”

Konstatante iom da simpatio, Pinĉer kun peno alproksimiĝis. "Ekstere en la arbaro, estis vigliga mateno," li plorblekis, "tia mateno, kiu instigas enbrakigi ĉion renkontatan, do kompreneble, vidante tiun aĉan longplumulon penantan ekflugi—ĝi estis tre juna, vi komprenas—mi tuj saltis sur ĝin."

"Ha!" diris la simpatianto, "vidite, farite, oni povus diri—" "Tute ne," interrompis Pinĉer, "por mi nur estis komencite. Ho, mi ĵus estis malaperigonta la fazaneton sen atendo, sed en la sama momento Li aperis" Li subite ĉesis paroli, kaj ĝemplendis pro memkompato "Kaj hieraŭ, "Li" ne povis sufiĉe min laŭdi, ĉar mi mortigis raton!" li aldonis malgaje "Kuraĝiĝu!" konsilis Diogenes, "vi scios nun kion fari. Proksiman fojon"

"Neniam estos proksima fojo," diris Pinĉer fervore. "Ĝis mia vivofino, mi neniam denove mortigos ion ajn."

"Ho ve!" li ĝemis post kelkminuta silento, "kio okazis nun?" Ĉar la maljuna raporthundo subite sidiĝis kaj rigardis lin malaprobe. "Mia juna amiko," li diris severe, "se vi ne mortigos ĉiun raton ĉe ekvido, tuj kiam ĝi elŝovis sian nazon el truon, vi estos aŭ mortpafata—" lia voĉo vibris solene, "aŭ oni donos vin al virino kiel dorlotbeston." La spanjelo konsterniĝis pro la terura sorto lin minacanta, kaj denove embarasa konfuziĝo ekkaptis lin.

"Ĉu vi volas diri, ke oni prave mortigas ratojn, sed malprave mortigas fazanojn?" li demandis nekredeme.

"Certe," flegme respondis Diogenes. "Senvivigi ratojn estas mortigo. Senvivigi fazanojn estas murdo. Se vi mortigos, oni karesos vian kapon. Sed se vi murdos, oni mortpafos vin."

"S—s—sed ĉu ĉiu en la mondo estas rato aŭ fazano?" balbutis Pinĉer. "Kompreneble," diris lia instruanto, levante la brovojn.

"Sed kiel ilin diferencigi?" kriis Pinĉer.

Diogenes ridetis superamaniere. "Estas necese scii," li respondis. "Mi ne scias," diris Pinĉer, malespere. "Mi ne deziris mortigi la raton, hieraŭ. Tio nepre ne estis mia propra ideo. Ĝi estis eĉ iom agrabla besteto, kaj verdire, mi ĵus intencis proponi al ĝi peceton de mia biskvito, kiam "Li" venis en la korton, kriegante;—Rato, rato, Pinĉer, rato! Ataku ĝin, Pinĉer, ataku ĝin! Do kompreneble, mi atakis. Sed aliokaze mi ne estus farinta tion."

"Ĉiu el ni estis iam juna," diris Diogenes, indulgeme.

"Nu, aŭskultu!" diris Pinĉer, post pripenso. "Kiu decidis ĉi tiun ratfazan an aferon?"

Diogenes, kiu intertempe dormetis, vekigis eksalte. "Ho saĝulo!" li diris. "Ne gravas, kiu fiksis la regulojn; ni devas obei ilin."

"Ĉu oni ne povas aliigi ilin?" opiniiis la saĝulo. "Estus pli klare se ni mortigus ĉion aŭ nenion; ĉi tiu ĉikana diferencigo, kio estas mortigo, kaj kio estas murdo, ŝajnas al mi sensencaĵo."

Diogenes ekscitiĝis. "Aŭskultu, junu Pinĉer!" li komencis en laŭava maniero. "Ĉi tiuj aferoj estis aranĝitaj longatempе antaŭ via naskiĝo."

"Sed, se ili estis malĝuste aranĝitaj?" kuraĝe interrompis la juna Pinĉer. "Kial mortigo al ratoj ne estas murdo? Kion pensas pri tio la ratoj?" "Kion pensas la ratoj?" ripetis Diogenes, kun grandega malestimo. "Pensi ne estas ilia afero. Esti mortigataj estas ilia afero, kaj la via estas, ilin mortigi. Homo faris la regulojn, mi certigas vin, kaj ni nepre obeas ilin."

—Tradukita el angla lingvo de E. L. Osmond, el la verkoj de Evelyn Sharp laŭ ŝia afabla permeso.—el Revuo.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 28 februaro ni ricevis la jenajn sumojn:—E. Ely, 9/-, junio '25; I. Majstrovich, 5/6, marto '26; H. A. Hodges, 5/-, junio '25; E. M. Wallace, 5/-, julio '25; A. Saar, 5/-,

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET, KEN.

junio '26; J. Smart, 4/6, januaro '26; S. E. Humphreys, 4/6, aprilo '25; J. Vodanovich, 10/-, junio '26; A. M. Carter, 9/-, junio '26; N. Grant, 4/6, novembro '24; Kontantaj, 11/8.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Bulgara Esperantisto, n-o 3-4; Belga Esperantisto, n-o 9-10; Esperanto Triumfonta, n-o 228; Heroldo de Esperanto, n-oj 1, 2, 3; Itala Esperanta Revuo, n-oj 12, 1; La Unuigita Tutmondaro, n-o decembro; La Suno Hispana, n-o 91; Le Monde Esperantiste, n-o 5; La Policisto, n-o 28-29; Sen-naciulo, n-o 13.

IMPOSTO JE FRAŬLOJ EN UKRAINO.

Tutukraina komitato de Sovjetoj aprobis antaŭ kelka tempo la leĝprojekton pri imposto je fraŭloj pli ol 18-jaraj, se ili edukas nenies infanojn aŭ ne havas invalidiĝintajn gepatrojn. La imposto estas destinita speciale por protekto al orfaj infanoj, kies nombro en sovjetlandoj ĉiam kreskadadas. Laŭ opinio de aŭtoroj de leĝprojekto la nomita imposto havos grandan social-politikan signifon, ĉar la fraŭloj partoprenos en la elspezoj de la ŝtato por komunuma edukado de la orfaj infanoj; krom tio ĝi ankaŭ korektos la nunan sistemon de salajrado, kiu ne distingas tarife la fraŭlojn je la familiuloj.

—N. Krassovskij (Lifa, Rusl.), Esperanta Triumfonta.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburno Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario,

s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso: Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Hardware Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Brisbane Esperanto Club. Sekretario S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunveno kaj poŝta adreso: ĉe F-ino Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidanto S-ro E. S. Bigelow. Sekretario, S. J. Parker. Poŝta adreso, Warring Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunveno kaj poŝta adreso, je la oka horo "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere.

Raciista Esperanta kaj Disko Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skirrie: sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunveno, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.